

Epidemiaj sekvoj en Eŭropo

Monato

28a jarkolekto - julio 2007/7

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Rankora fino
de Tony Blair**

Vojaĝo en Iberio

**Monumenta krizo
en Estonio**



Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Monumenta krizo

Post longa politika disputo la registaro de Estonio decidis formovi la tombojn de 12 sovetiaj soldatoj kaj la tombomonumenton el la centro de la ĉefurbo. La decido kondukis al nokto de rabado en Talino kaj al monumenta krizo en rilatoj kun Rusio.

KALLE KIVILÄ



8

POLITIKO

Estonio	8
Monumenta krizo	
Historiaj faktoj pri Estonio	
Britio	11
Komence kora, fine rankora	
Albanio	12
Kien la oro?	
Svisio	13
Pli granda, pli aĝa	
Nepalo	13
Reĝo kaj leĝo	

TURISMO

Sud-Eŭropo	14
Vojaĝo en Iberio	

MODERNA VIVO

Arkeologio	18
Navige tra prahistorio	
Sano	19
Sed <i>Tamiflu</i> ne fluas	
Aŭtoj	19
Steluloj ĉe la stirilo	

EKONOMIO

Ĉinio	20
Busaj servoj plibonigendaj	
Pli da riĉeguloj	21

SCIENCO

Tutmonda plivarmigo	22
Epidemiaj sekvoj en Eŭropo	

LIBROJ

Opinioj plej kompetentaj	24
Histori-romano	25

POEZIO

Ses miniaturaj humuraĵoj	26
---------------------------------------	----

Komence kora, fine rankora

11

Post dek jaroj kiel brita ĉefministro Tony Blair anoncis en majo la daton de sia ekŝiĝo – la 27an de junio. Li postlasas ŝtaton plurpunkte pli fortan kaj pli prosperan ol en 1997, sed, kontraste, pli cinikan kaj konfuzitan. Ekonomie la lando de Blair floris, aparte dum la fruaj jaroj. Senlaboreco restis malalta, ankaŭ inflacio. Helpataj estis la plej malriĉaj en la socio. Edziĝi rajtas samseksemuloj; ne plu tolereblas vulpo-ĉasadado; kaj baldaŭ en publikaj lokoj oni ne rajtos fumi. Sed ĉu tio sufiĉas?

Vojaĝo en Iberio

14

Post trisemajna restado, Tatjana Loskutova iom triste adiaŭis Iberion. Tamen por ĉiam restos en ŝia memoro ambaŭ vizititaj landoj kaj ties loĝantoj, kiujn kunigas geografio, historio kaj kulturo. Krome, laŭ ŝi, varma gastameco estas unu el la komunaj ĉefrajtoj de iberianoj.



Epidemiaj sekvoj en Eŭropo

22

La tutmonda plivarmiĝo estas danĝera ne nur pro tiaj teruraj sekvoj, kiel subakvigado de la multaj apudbordaj urboj, uraganoj ktp, sed ankaŭ pro kredebla apero de multnombraj epidemioj de la danĝeraj infektaj malsanoj. Tial tre gravas anticipe entrepreni preventajn agadojn kontraŭ probablaj epidemioj.



Vizitu
www.Monato.net
kun novaj kontribuoj ĉiutage!

Senpagan pasvorton por viziti la paĝojn vi petu de monato@monato.net.
Menciu vian FEL-kodon, kiun vi trovos supre sur la adreŝilipo.

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be (eblas ĉifri la mesaĝon per PGP/GPG).
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifo

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugalia	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijk 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelsö, 5 Craighill Road, Kincadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel. 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto MONATO: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
- **Hilde:** Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
- **Literatura-Servo "Espero",** Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
- **Hans:** Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- **Wolfgang:** Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wa-

- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwoleskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiusl@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8042. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
- **Halina R. Gorecka,** RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
- **Mikaelo Ĉertilov,** Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
- **Esperanto-Skolan,** Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
- **Sveda Esperanto-Federacio,** c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleeodorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵ artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiiilo: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinktitita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Shlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

EU-malsano



Ĉu vi havas birilon? Estas tiu komputileto, kiu indikas al vi itineron de urbo A al urbo B per mapeto kaj per cifereca voĉo, kiu diras „Ĉe la kruciĝo turnu dekstren!” Se vi posedas birilon, vi scias, ke ĝi funkcias helpe de GPS. Tiun satelitan sistemon instalas la usona armeo por siaj soldatoj, sed poste disponigis al ĉiuj. Sed ĉu vi ankaŭ scias, ke la usona armeo senaverte povas malŝalti la sistemon? En tiu okazo vi starus meze de granda fremda urbo kaj ne plu scius, kien stiri la aŭton por trovi la loĝejon de via amiko! Certe, ĝis nun tio neniam okazis, sed ja *povus* okazi, ekzemple por malhelpi teroristojn trovi siajn atencocelojn. Pro tiu terura eventuala risko Eŭropa Unio (EU) planas propran satelitan bir-sistemon kun la bela nomo „Galileo”. Ĝi estos, laŭ la promesoj, multe pli potenca kaj preciza ol GPS kaj ankaŭ multe pli kapabla ol sistemoj de Rusio aŭ Ĉinio. Por realigi la planon, la EU-registaroj kunigis ĉiujn kompetentajn kompaniojn de EU en unu komuna konsorcio.

Sed ho ve! Nun montriĝas, ke tiu konsorcio suferas tipe eŭropan malsanon: naciisman ĵaluzon. Laŭ la planoj, la centralo de *Galileo* troviĝos en Germanio. Sed nun ankaŭ Italio kaj Hispanio postulas tian centralon – kiel infanoj en sablokesto, kiuj nepre volas havi la saman muldilon, per kiu ludas najbara infano. Krome tia projekto bezonas longdaŭran fincan investadon kun grandaj riskoj; sed tiujn riskojn nek la unuopaj entreprenoj, nek la konsorcio volas ŝultri. Kion faru EU? Kutime en tiaj okazoj oni transdonas la taskon al alia kompetenta kompanio, sed ĉar oni ja kunigis ĉiujn por tio taŭgajn kompaniojn, restas neniu konkurenco ... la konsorcio havas monopolon kaj povas dikti al la politikistoj siajn postulojn. Por eviti ĝin, EU nun volas pagi la sistemon per la mono de la impostpagantoj. Tio kostos por la EU-civitanoj minimume 2,4 miliardojn da eŭroj. Dume mi deziras al vi bonan vojaĝon per GPS kaj esperas, ke la usona armeo ne malŝaltos ĝin.

Sincere via

Stefan MAUL

Casals hispanigita

Konsternis min legi en la recenzo de Sen Rodin (MONATO 2007/6, p. 22) la nomon de la fama violonĉelisto Pau Casals [paŭ kazals] hispanigita. Pau Casals naskiĝis en El Vendrell (Katalunio) la 29an de decembro de 1876 kaj estis unu el la plej bonaj violonĉelistoj de la 20a jarcento.

Krom muzikisto, la famkonata violonĉelisto estis paca homo. En 1933 li rifuzis ludi en la filharmonio de Berlino pro la regado de Adolf Hitler kaj pro la persekutoj de lia nazia reĝimo. Unu jaron poste estis inaŭgurita en Barcelono la avenuo Pau Casals. En 1939, kiam la armeo de la generalo Franco prenis Barcelonon, li ekziliĝis en Parizo, kaj en 1940, pro invado de la germana armeo, li forfuĝis en Amerikon. Dum la tuta diktaturo de Franco li helpadis ekzilitajn hispanojn. Dum sia tuta vivo, Pau Casals konstante agadis favore al paco, al justeco, al libereco kaj al sia lando Katalunio.

Kiam en 1971 U Thant, ĝenerala direktoro de Unuiĝintaj Nacioj, donis al li la Medalon de la Paco, Casals diris: „Tio ĉi estas la plej granda honoro, kiun mi ricevis en mia vivo. Paco ĉiam estas mia plej granda zorgo. Jam dum mia infaneco mi lernis ĝin ami [...]. Permesu al mi diri ion al vi. Mi estas kataluno, ano de nuntempa provinco de Hispanio. Sed kio estis Katalunio? Katalunio estis la plej granda lando en la mondo. Katalunio

havis la unuan parlamenton longe antaŭ ol Anglio. Katalunio havis la komencon de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiuj aŭtoritatoj de Katalunio kunvenis dum la 11a jarcento en franca urbo – tiutempe kataluna – por priparoli pacon [...]. Jen kio estis Katalunio.” Tiuj ĉi paroloj de Pau Casals estas spekteblaj en *Youtube* pere de la ligilo youtube.com/watch?v=AKlkO3Tt3Kw.

Pau Casals estas por la katalunoj ne nur unu el la plej grandaj muzikistoj de nia tempo, sed ankaŭ elstara kontraŭfaŝisto, pacbatalanto kaj defendanto de la rajtoj de la kataluna popolo. Unu el la plej grandaj petoj de la katalunoj estas respekti la katalunecon de lia nomo, ofta peto ĝis nun ĉiam ignorita.

Ferriol MACIP i BONET
Katalunio

Neŭtrale homa: kiom da interpretoj?

Mi ĉiam opiniis, eble pro malmulta aŭ malsimila fundamento, ke la zamenhofa esprimo „neŭtrale homa” estu interpretata laŭ la lumo de alia lia esprimo rilatanta al religio: „potenca senkorpa mistero, fortego, la mondon reganta”. Ĉiuj religioj povas sin rekoni en tiu minimuma denominato, al kiu ili povas aldoni siajn proprajn dogmojn; kaj per tia rekono ili eniras en la mondkoncepton de „neŭtrale homa”. Sed nun, legante kaj relegante la recenzon de Carlo Minnaja pri la libro *Mi*

estas homo (MONATO 2007/5, p. 19-21), mi tentiĝas ŝanĝi mian opinion, kvankam tio igus Zamenhofon iom zigzaganta kaj eble ne tre kohera.

Se mi persistus en tiu mia interpreto pri la zamenhofa „neŭtrale homa”, mi trovus, male al Minnaja, ke eĉ religioj, kiel la hebrea kaj kristana, kiuj sian anaron epitetas (aŭ epitetis) „popolo elektita”, perfekte inkludiĝas en tiu mia (nur mia, certe!) interpreto pri „neŭtrale homa”, ĉar eĉ ili esence kredas je tiu komuna denominato. Kaj, krome, certe ankaŭ Zamenhofsciis, ke ĉiu religio pretendas esti la vera, la unika vera, kaj ke tiu konvinko ne multe distingiĝas de tiu de „elektita popolo”.

Armando ZECCHIN
Italia

Gejoj en Moskvo

La urbestro de Moskvo Juriĵ Luĵkov deklaris pri gejo-festo okazonta en la rusa ĉefurbo: „Ĝi estas spektaklo de Sattano. Neniam, neniam mi permesos tian porkaĵon en mia urbo!” Ni preterlasu la malestimon pri porkoj (kiujn tamen li manĝas); ni ankaŭ preterlasu, ke sekve de tiu militproklamo oni bastonis kaj arestis pacajn manifestaciantojn, inter kiuj estis tri deputitoj (eŭropa, rusa, itala). Ja tiaj bagateloj okazas jam ĉie, sub ia ajn reĝimo. Temas ja pri sekureco.

Restas la kerno: senkulpaj civitanoj estas senigataj de civitanaj rajtoj kaj traktataj kiel krimuloj simple kaj ekskluzive pro la fakto, ke iliaj seksaj inklinoj estas diferencaj disde la seksaj inklinoj de la plimulto. Tio ŝajnas al mi malfacile komprenebla kaj tolerebla, ĉefe en lando, kies estraro proklamas sin „demokrata”.

Mi estas nek gejo nek viando-manĝanto. Tamen, kiel homo kaj kiel vegetarano, mi firme, obstine defendadas la rajton de ĉiu homo esti gejo aŭ viandomanĝanto aŭ ion-ajn-kredanto, se tiu tion libere elektas sen damaĝi aliajn homojn. Ion similan diris iam Voltaire, sed oni forgesis.

Nur reciprokaj konatiĝo, interaŭskultado kaj respekto povas savi nian ferocan specion disde la memdetruo. Ni esperu, ke ne estas jam tro malfrue.

Filippo FRANCESCHI
Italia

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de Monato. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



Sango kaj rango

de Paul GUBBINS

La novaĵo, ke juna arme-oficiro volas plenumi sian devon, ŝultron ĉe ŝultro kun siaj regimentanoj, servante kaj la patrujon kaj la monarkinon, ne aparte surprizas. Armeanoj armeas, same kiel instruistoj instruas kaj busŝoforoj ŝoforas. Tamen pli komplikas la situacio, kiam la oficiro estas la dua filo de la brita kronprinco, do la tria tronheredonto, kies regimento estas ekmilitonta en Irako.

Princo Harry, kiu nur antaŭ nelonge finis sian trejnadon ĉe la armea altlernejo *Sandhurst*, laŭ diversaj raportoj forte deziras militservi. Li trejniĝis, laŭ amikoj, ne por sidi ĉe armea skribotablo, dum liaj kolegoj alfrontas ĉiutagajn danĝerojn en Irako. Tiel kelkaj britoj atentigas pri la „kuraĝo” de la princo.

Dume en Irako, laŭ aliaj raportoj, partizanoj kaj gerilanoj jam salivumas pro la ideo, ke la princo deĵoros en nur leĝere kirasita skoltad-veturilo sur iliaj stratoj kaj ŝoseoj. En similaj veturiloj jam mortis dekoj da britaj soldatoj. Jam anoncis irakaj milicianoj, ke pro spionoj en la britaj kazernoj ili perfekte scios, kie kaj kiam la princo eliros el la relativa sekureco de sia bazo.

Trejnitaĵ trupoj

Por protekti la princon – ironie, ĉar la princo kaj la brita soldataro okupas Irakon teorie por protekti la popolon – la brita armeo planas sendi aparte trejnitaĵ trupojn al Irako. Kiamaniere ili protektos, sekretas. Sed taĉmentoj tiaj kaŭzas plian finanĉan ŝarĝon portotan de britaj impost-pagantoj, kiuj plejparte kontraŭis kaj plu kontraŭas la militon, argumentebla kontraŭleĝan, entreprenitan de ĉefministro Tony Blair sen antaŭa parlamenta debato.

Estiĝas alia kaj pli grava konsidero ol pure finanĉa: la homa. La ĉeesto

de la princo en Irako preskaŭ certe endanĝerigos la vivojn de kolegoj. Ili estos elmetataj al kromaj riskoj, nur pro privilegia kaj dorlotita junulo, kiu pro sango kaj rango povus facile okupi skribotablon anstataŭ fremdan kaj malamikan landon.

Ĉu do princo havu la rajton tiel ludi kun la vivoj de aliaj homoj? Ĉu ne „noblesse oblige”; ĉu ne rango postulas ne oferedon, sed iufoje sinoferadon? Ĉu ne la princo – juna masklo volanta sin pruvi en la mondo – fakte montrus sin pli kuraĝa, pli heroa, pli matura, rezignante pri sia – kio? ĉu gloro? – en Irako, samtempe akceptante, ke la agadkampo eĉ de princoj – aparte de princoj – estas strikte limigita pro konsideroj pli vastaj ol nur personaj?

Decidis ne mi

Tony Blair opinias, ke la decido militservi la princon en Irako estu tiu de la armeo, ne la registaro. Tiam, kiam mortpafita princo hejmenrevenos, kiel jam centoj da armeanoj, en ĉerko, li povos sin senkulpigi: decidis ne mi, sed la generaloj. Samtempe tiuj, kiuj volas, ke la princo montru sin viro en Irako, estos inter la unuaj, kiuj plej laŭte hurlos kontraŭ la monstroj, kiuj sendis junan princon al morto en fora lando pro milito, pri kiu neniu plu kredas.

Funde de la debato pri la soldato-princo kuŝas la monarkio – anakronisma karbunklo, kies heredaj principoj insultas la noción de demokratio. Jam de jardekoj la brita monarkio laŭdire volas prezenti pli modernan, pli mildan vizaĝon. Tamen la du filoj de la kronprinco restis fidelaj al sia klaso kaj trejniĝis ĉe la armea altlernejo. Nepras, ŝajne, ke estonta brita monarko lernu mortigi kaj ne, ekzemple, kuiri, kontadi, kuraci aŭ alimaniere utili al sia popolo.

Fakte, moderna monarkio estas kontraŭdiro. Monarkio kaj moderneco

SUPPLIED



Laŭ diversaj raportoj, Princo Harry forte deziras militservi.

tiom similas, kiom tago kaj nokto. En Britio pli kaj pli montriĝas la abismo inter la anakronismaj postuloj de hereda monarkio kaj la bezonoj de moderna, demokratita ŝtato. La sola maniero aboli la dilemon pri la militservado de Harry en Irako estas aboli la monarkion.

Fine decidis la generaloj. La volo de la princo estos respektata: Harry militservos en Irako. Evidente: kial princi, se generaloj ne obeos? Intertempe imageblas, ke irakaj milicianoj benas la generalojn, kiuj sendos al ili predon tiel princan.

Tri semajnojn post la decido sendi la princon al Irako, la generaloj – bone, ke Britio posedas tiom da klarvidaj kaj firmdecidaj militistoj – anoncis, ke Harry tamen restos hejme. Estos tro danĝere por la princo, opiniis la generaloj. Tuj replikis la patrino de ordinara soldato mortigita en Irako: „Se tro danĝeras por Harry, ankaŭ tro danĝeras por niaj knaboj.” ■

ESTONIO

Monumenta krizo

La bronza soldato en Tallinn unu tagon antaŭ ol ĝi estis forportita al kaŝejo.

Post longa politika disputo la registaro de Estonio decidis formovi la tombojn de 12 sovetiaj soldatoj kaj la tombomonumenton el la

centro de la ĉefurbo. La decido kondukis al nokto de rabado en Talino kaj al monumenta krizo en rilatoj kun Rusio.

Kolera ruslingvano dum pluraj minutoj kriis al la estonaj policianoj: „La estona registaro hontu”. Ĵurnalistoj fotis kaj filmis, la policianoj faris nenion.

La „Bronza soldato” en la centro de Talino ne vere estis la ĉefa kaŭzo de la krizo, sed nur katalizilo. La „Bronza soldato” estis starigita en 1947 de la sovetia registaro de Estonio honore al la „Liberigintoj de Talino”. Por multaj estonoj la monumento tamen simbolis ne liberigon, sed sovetian okupacion de la lando. Post la sendependiĝo de Estonio en 1991 la teksto sur la monumento estis ŝanĝita al pli neŭtrala „Por la pereintoj en la dua mondmilito”.

Spite la pli neŭtralan tekston, la sovetia monumento en la centro de la ĉefurbo plu iritis multajn estonojn, precipe ĉar ruslingvaj milit-veteranoj kun ruĝaj flagoj kutimis kolektiĝi ĉe la monumento dum la tradicia sovetia venkotago, la 9a de majo. La statuo estis kelkfoje farbita de nekonatoj.

„Faŝisma” formovo

Antaŭ la elektoj, okazintaj en marto 2007, la ĉefministro Andrus Ansip



promesis formovi la statuon, se lia dekstra partio gajnos. Lia partio venkis en la elektoj, kaj fine de aprilo oni komencis prepari la movon de la statuo. Multaj ruslingvaj loĝantoj de Estonio forte malŝatis la decidon transloki la sovetian monumenton. La plej multaj el ili regule sekvas rusiajn ŝtatajn televidkanalojn, kiuj aparte atentigas pri la konflikto. La rusiaj kanaloj aludis, ke estus „faŝisme” formovi statuon honorantan sovetiajn soldatojn, kiuj batalis kontraŭ la nazia Germanio.

Frumatene la 26an de aprilo barilo estis rapide starigita ĉirkaŭ la „Bronza soldato”, kaj laboristoj komencis konstrui grandan tendon super ĝi. Ĉe la barilo, gardata de multaj policanoj, kolektiĝis centoj da koleraĵ ruslingvaj loĝantoj de Talino.

„Ĉi tio estas ja faŝismo, alimaniere ne eblas nomi ĉi tion,” diris 28-jara Artur Bujlo, kiu fiksas ruĝajn diantojn sur la barilon. Sed lia ĉefa plendo ne temis pri la statuo. „Mi naskiĝis en Talino kaj loĝas ĉi tie mian tutan vivon. Tamen mi devus trapasi lingvan ekzamenon pri la estona por rajti iĝi civitano. Nun mi havas neniajn rajtojn,” li diris.

Tranĉila vundo

La saman nokton junuloj, ĉefe ruslingvaj, amasiĝis en la stratoj de Talino, disrompis fenestrojn kaj prirabis butikojn. Dum la amasa ribelo estis mortigita 20-jara ruslingvano kaj civitano de Rusio, Dmitrij Ganin. Li mortis pro tranĉila vundo, kaj tri semajnojn poste du junuloj kun estonaj nomoj estis arestitaj lige al la kazo. Post la perforta nokto la „Bronza soldato” estis urĝe forportita kaj baldaŭ starigita en sia nova loko, en militista tombejo kelkajn kilometrojn for.

La rusia propaganda kampanjo intensiĝis. En Moskvo agresemaj manifestacioj el por-registaraj junularaj organizaĵoj dum semajno blokadis la ambasadon de Estonio. Aperis subitaj „teknikaj problemoj” pri trajn-transporto inter Rusio kaj Estonio. La ponto ĉe la limo de Rusio kaj Estonio en Narva estis fermita kontraŭ kamiona trafiko sur la rusia flanko, rusiaj politikistoj admonis homojn bojkoti estonajn varojn, kaj reprezentantoj de por-registaraj junuloj ▶

KALLE KIVILÄ



La 26an de aprilo granda tendo estis rapide konstruita super la monumento.

Historiaj faktoj pri Estonio

Estonio iĝis sendependa ŝtato fine de la unua mondmilito, lige kun la rusia revolucio. Sian sendependecon Estonio perdis, post kiam Sovetio kaj la nazia Germanio dividis orientan Eŭropon laŭ la traktato Molotov-Ribbentrop. En 1939 Sovetio devigis la tri baltajn landojn akcepti sovetiajn militajn bazojn, kaj kun subteno de la sovetiaj trupoj la lando rapide estis sovetigita.

En parlamentaj elektoj somere de 1940 rajtis partopreni nur kandidatoj de la nova Estona Laborista Alianco, kreita ĉirkaŭ la Estona Komunisma Partio, kiu ankoraŭ printempe de 1940 havis nur 133 membrojn. La nova parlamento tuj decidis, ke Estonio iĝu parto de Sovetio. Proksimume 2000 personoj estis ekzekutitaj dum la unua jaro de sovetia regado, 19 000 malliberigitaj kaj senditaj al la internaj partoj de Sovetio.

Kunlaboro kun komunistoj

Germanio atakis Sovetion en junio 1941 kaj la germanaj trupoj atingis Estonion jam en julio. Dum la germana okupacio estis ekzekutitaj proksimume 6000 loĝantoj de Estonio, ĉefe judoj, komunistoj, aŭ homoj, kiujn oni ofte senbaze akuzis pri kunlaboro kun komunistoj. Proksimume 100 000 personoj fuĝis el la lando en 1944, kiam la sovetia armeo denove proksimiĝis. Aŭtune de 1944 la sovetiaj trupoj revenis al Estonio, kaj baldaŭ pliaj 5000 estonoj estis malliberigitaj kaj ekzilitaj.

Estonio estis regata de komunistoj senditaj el Rusio ĝis la jaro 1988, kiam unuafoje denaska estoniano kaj estono, Vaino Väljas, iĝis la unua sekretario de la Estona Komunisma Partio. Dum la sovetia regado la proporcio de estonlingvanoj en la lando malkreskis de pli ol 90 % al iom pli ol 60 %. Aŭtune de 1991 Estonio iĝis sendependa. En 2004 Estonio aliĝis al Eŭropa Unio.

► laraj organizaĵoj vizitadis vendejojn por kontroli ĉu estas vendataj estonaĵoj.

Pint-renkontiĝo

La rilatoj inter Estonio kaj Rusio en majo 2007 atingis sian plej malaltan punkton post la sendependiĝo de Estonio en 1991, kaj la konflikto influis ankaŭ la rilaton inter Eŭropa Unio kaj Rusio. Dum la pint-renkontiĝo de EU kaj Rusio, fine de majo, Rusio estis kritikata pro perforta dispelo de pacaj manifestacioj, kaj aresto de homoj, kiuj ankoraŭ nenion faris, sed nur planis manifestacii.

„En Estonio oni ne nur dispelas manifestaciojn, tie oni mortigas manifestaciintojn,” replikis prezidanto Putin, kaj akuzis la estonan policon pri la morto de Dmitrij Ganin. La prezidanto de la supera ĉambro de la rusia parlamento, Sergej Mironov, siavice oficiale proponis, ke la strato, kie situas la ambasado de Estonio en Moskvo, ricevu

la nomon „Strato de Dmitrij Ganin”.

La regantaj politikistoj de Rusio dum la lasta tempo konstante serĉas eksterajn malamikojn, ĉu por forturni la atenton de internaj problemoj kaj manko de demokratio, ĉu por altigi sian profilon. Nun estas la vico de Estonio esti tia malamiko. Sed la konflikto ĉirkaŭ la „Bronza soldato” tamen estas interna afero de Estonio, kaj ĝi estas nur la pinto de glacia monto, kies ĉefa parto restis ĝis nun sub la surfaco.

Trapasi ekzamenon

Proksimume triono de la loĝantoj de Estonio denaske parolas la rusan, sed la rusa lingvo havas nenian oficialan statuson en la lando. Publikaj ŝildoj devas esti en la estona eĉ en regionoj, kie preskaŭ neniuj parolas la estonan. Duono de la ruslingvanoj en Estonio ne ricevis civitanecon de la lando, kvankam multaj el ili eĉ naskiĝis tie, kaj por fariĝi civitanoj ili devas trapasi ekzamenon pri

la estona lingvo. Tial iuj el ili anstataŭe prenis la civitanecon de Rusio.

Estas facile kompreni la estonojn, se konsideri, ke pro Sovetio ilia lando perdis sian sendependecon en 1940 kaj ili estis subpremataj dum jardekoj. Sed same facile estas kompreni la ruslingvanojn de Estonio, kiuj nun sentas sin subpremataj en sia naskiĝlando.

Por malpliigi la kontraŭstaron inter la popolgrupoj necesus, ke ankaŭ la ruslingva minoritato povu senti sin aprezata parto de la estonia socio. Oficiala dulingveco apenaŭ eblos en la reganta politika klimato de Estonio, sed evidente la aprilaj okazaĵoj malfermis la okulojn de multaj estonoj al la problemo. Oni eĉ ĉe alta nivelo ekdiskutis la eblecon fondi ruslingvan nekomercan televidkanalon en Estonio.

Aliflanke plu validas la plano por plia estonlingvigo de la ruslingvaj lernejoj en Estonio. Tiu plano ne estas populara inter ĉiuj ruslingvanoj.

Kalle KNIIVILÄ

Posttagmeze la 26an de aprilo venis pli da policanoj, kaj la placo antaŭ la monumento estis malplenigita.



KALLE KNIIVILÄ



BRITIO

Komence kora, fine rankora

Post dek jaroj kiel brita ĉefministro Tony Blair [teŭni blea] anoncis en majo la daton de sia eksiĝo – la 27an de junio. Ke Blair intencis eksiĝi iam antaŭ la venontaj tutlandaj elektoj (ne okazontaj ĝis post du jaroj), ne estis sekreto: la ĉefministro ekadiaŭis jam antaŭ la pasintaj elektoj, sed rifuzis indiki precizan eksiĝo-daton. Tiel, dum la lastaj jaroj li fariĝis iasence nur provizora ĉefministro, kies povo kaj influo neeviteble vaporigis.

Li postlasas ŝtaton plurpunkte pli fortan kaj pli prosperan ol en 1997, sed, kontraste, pli cinikan kaj konfuzitan. Ekonomie la lando de Blair floris, aparte dum la fruaj jaroj, verdire danke al la ministro pri financo Gordon Brown (verŝajne la ĉefministra posteulo de Blair). Senlaboreco, kompare ekzemple kun tiu en Germanio aŭ Francio, restis malalta, ankaŭ inflacio. Helpataj estis la plej malriĉaj en la socio, ekzemple pensiuloj kaj gepatroj kun junaj infanoj. Edziĝi rajtas samseksemoj; ne plu tolereblas vulpo-ĉasado; kaj baldaŭ en publikaj lokoj oni ne rajtos fumi.

Troaj kaj timaj

Sed ĉu tio sufiĉas? Pro enormaj parlamentaj plimultoj, kaj pro la bonvolo de la brita popolo (kontraŭe, tamen, de la konservativa, kontraŭeŭropa kaj potenca bulvarda gazetaro), Blair posedis mandaton ŝanĝi kaj modernigi Brition. Tamen la reformoj montriĝis troaj kaj timaj. Troaj en la senco, ke la registaro suferis pro iniciatozo: senĉese elfluis el registaraj oficejoj planoj kaj projektoj, skemoj kaj skizoj,

plejparte ĵargono-riĉaj, sed praktikopovraj, tiel ke fine neniu plu kredis ministrajn eldirojn kaj aliajn anoncojn el la registara aparato.

Elektote, Blair indikis kiel prioritaton klerigadon. Nun, anstataŭ travidebla ŝtata lerneja sistemo, ekzistas miriada da lernejoj, privataj, duonprivataj, regataj de fondusoj, firmaoj aŭ lokaj instancoj, ĉiuj proponantaj la ŝtatan studprogramon, sed kelkaj specialiĝantaj pri natursciencoj, inĝenierado aŭ artoj. Cetere, registaraj specialistoj pri publikaj rilatoj insistas, ke la klerec-nivelo jaron post jaro altiĝas. Dume plendas industriistoj kaj aliaj dungantoj, ke mankas bazaj kapabloj pri matematiko kaj la angla lingvo. Kiun kredi? Tiel enŝoviĝas en la landan menson cinikismo kaj konfuzo.

Privataj kuracejoj

Same la landa sansistemo. La registaro investis rekorde kaj, certe, pacientoj ne tiom longe atendas operaciojn. Aliflanke, la sanservo estas tiom ofte reformita, ke kuracistoj kaj flegistoj, kies postenoj kaj eĉ foje hospitaloj estos eliminataj, seniluziiĝas. Krome, malgraŭ la investoj, en pluraj partoj de Britio ne plu laboras kadre de la ŝtata sanservo dentistoj. Pacientoj estas devigitaj viziti privatajn kuracejojn kaj, memevidente, pagi pli ol laŭ la ŝtata sistemo.

Parlamentoj

Aliaj reformoj montriĝas supraĵaj kaj senkuraĝaj. Anstataŭ aboli la neelektitan, nedemokratian superan parla-





MANUEL BARTUAL

Certgrade mankas financaj rimedoj por plibonigi la ĉiutagan vivon de ordinaraĵaj britoj pro la eksterlanda politiko de Blair, kiu resumeblas unuvorte: Irako.

► mentan ĉambron – la t.n. Ĉambron de Lordoj – okazis duonbakita reformo, kiu ne forbalais la bazan maljustecon de parlamentanoj neelektitaj. Enkondukitaĵ estis naciaj asembleo en Kim-

rio kaj parlamento en Skotlando, kun malsimilaj povoj, sed neniu nacia parlamento en Anglujo. Kimraj kaj skotaj deputitoj estas elektitaj per proporcia voĉdonado – ankoraŭ permesitaj nek

en lokaj elektoj en Anglio, nek en britaj tutlandaj elektoj. Denove: politiko nekohera, kiu konfuzas kaj cinikigas. Almenaŭ en Nord-Irlando funkcias provinca parlamento (sed ne nur Blair respondecas pri ĝia starigo).

Nukleaj submarŝipoj

Restas aliaj farendaĵoj. Britoj demandas sin, kial ilia lando, la kvina plej riĉa en la mondo, posedas ĥaosan kaj, rilate fervojojn, ege multekostan transport-sistemon; kial rubaĵoj plu makulas komunumojn kaj kampojn; kial politikistoj parolas pri, sed ne agas kontraŭ poluado, planante, ekzemple, novajn flughavenojn por ekologie nedefendeblaj rabat-flugoj; kial, kiam enposteniĝis pli da policanoj, kreskas krimado. Alivorte, britoj sin demandas, kial troveblas mono ekzemple por novaj nukleaj submarŝipoj, sed ofte ne por lokaj lernejoj, hospitaloj aŭ aliaj servoj.

Certgrade mankas financaj rimedoj por plibonigi la ĉiutagan vivon de ordinaraĵaj britoj pro la eksterlanda politiko de Blair, kiu resumeblas unuvorte: Irako. Irako, kiu tage konsumas milionojn da pundoj (ankaŭ junajn soldatojn); Irako, kiu konsumis ankaŭ la reputacion de Blair. Blair, kiu en 1997 promesis ludi pli kernan rolon en Eŭropa Unio ol antaŭaj britaj ĉefministroj, tamen pro Irako pelis sin en la brakojn de George Bush kaj en militon, kiun kontraŭis – nun eĉ pli kontraŭas – la brita popolo. Sincere, sed misgvidate surbaze de plej dubindaj informoj, Blair pravigis la Irak-militon, dirante, ke posedas Irako amasdetruajn armilojn, per kiuj eblus minaci kaj ataki Brition. Britoj ne forgesos, kaj ne pardonos, ĉi tiun eraron.

Historiistoj verdiktos pri Blair, ke li misuzis, aŭ eĉ tute ne uzis, la eblojn donitajn al li de la brita popolo. Li restis esence konservativa ĉefministro, kiu tro timis la bulvardan gazetaron, samtempe ne sufiĉe fidis parlamenton, por realigi fundajn, radikalajn kaj longdaŭrajn reformojn. Iasence Blair fariĝis alia viktimo de la t.n. kontraŭterorisma milito, certe de la Irak-milito. Tiel tio, kio kore komenciĝis en 1997, rankore finiĝis en 2007.

Paul GUBBINS

ALBANIO

Kien la oro?

Lastatempe la albana nacia banko sciigis, ke ĝiaj or-rezervoj estas nur 372 kg. Sed antaŭ la dua mondomilito Albanio estis kvazaŭ ora insulo en Balkanio. Ekzemple, en 1938, unu jaron antaŭ la okupado itala, troviĝis en la ŝtata trezorejo 2400 kg da oro. Tamen ĉe ordinaraĵaj civitanoj troviĝis multe pli da oro, ĉar tiam ili posedis orajn monerojn kaj bankbiletojn kun ora ekvivalento. Rilate oron Albanio kalkuliĝis inter la plej riĉaj landoj.

Laŭ dokumentoj de la ministrejo pri internaj aferoj, la komunista reĝimo estis sekvestrinta ĝis la jaro 1948 entute 43 816 682 orajn monerojn kun pezo de 320 000 kg, aŭ 320 tunoj. Tiam, en la banko, troviĝis 90 kg da oro, do plejparte la oro estis en la manoj de civitanoj. En tiu epoko centoj da albanaj familioj, senigitaj de sia oro, estis persekutataj de la sekreta polico.

Ligo de Nacioj

Albanio sendependiĝis de Turkio en 1912. Cirkulis en la lando krom turkaj oraj moneroj ankaŭ aliaj, inkluzive de britaj. En 1920 la registaro emisiis unuafoje albanajn moneron kaj banknoton kun ora ekvivalento. Laŭ raporto antaŭ la Ligo de Nacioj Albanio disponis tiutempe ankaŭ pri granda kvanto da valoraj metaloj. En 1926 ekcirkulis moneroj kun valoro de 100 oraj frankoj kaj jaron poste ankaŭ 20 oraj frankoj.

La reĝo Zog la 1a forlasis la patron en aprilo 1939 kaj forportis ĉirkaŭ 183 kg da oro el la ŝtata trezorejo. Post la kapitulaco de Italio germanoj forrabis albanan oron el la banko en Romo, kie troviĝis ĉirkaŭ 2,5 tunoj. Post la kolapso de Germanio forprenis la albanan oron britoj, kiuj ne redonis ĝin pro la tiel nomata korfua incidento, kiam Britio taksis Albanion komplica en la dronigo en 1946 de du britaj marŝipoj.

Bardhyl SELIMI

Pli granda, pli aĝa

Antaŭvideblas, ke ĝis 2030 la loĝantaro de Svisio – en 2005 7 459 100 homoj – atingos ok milionojn, ĉefe pro enmigrintoj. De jardekoj la lando suferas pro malalta nombro de naskoj: po 1,42 infanojn naskas averaĝa virino. Ne sufiĉas enlandaj laborfortoj por ebligi normalan kreskon de la ekonomio.

En la 1970aj jaroj la registaro invitis eksterlandanojn labori en Svisio. Onde alvenis enmigrantoj el sud-eŭropaj landoj, precipe Italio, timigante grandajn sekciojn de la svisaro, kiu ne kutimis vidi tiom da fremduloj ene de la landlimo. La registaro elpensis laborpermesilo-sistemon kaj nuntempe laboras en Svisio diversaj etnoj pli-malpli akceptataj de la prasvisoj. Eksterlanda-

noj konsistigas 20,7 % de la hodiaŭa loĝantaro.

Spite sian kreskon, la loĝantaro maljuniĝas. Laŭ ĵusa raporto de la Svisa Statistika Oficejo la nombro de loĝantoj aĝantaj pli ol 65 jarojn pligrandiĝos de la nunaj 16 % ĝis 24 %

en 2030, kaj eĉ pli ol 30 % en iuj kantonoj. La ŝveliĝo de la aĝularo kaj la ŝrumpiĝo de la junularo povus havi sekvojn en sektoroj kiel edukado, sanservoj, laboro, sociala asekuro kaj la nombro de hejmoj.

Marteno ECOTT

La svisa loĝantaro maljuniĝas, kio povas havi sekvojn por sanservoj, sociala asekuro kaj aliaj sektoroj.

Reĝo kaj leĝo

Antaŭ la jaro 1990 oni ne rajtis en Nepalo laŭleĝe paroli pri la reĝo aŭ pri lia familio. Oni elturniĝis, dirante ekzemple: „Mi aŭdis pri la reĝo, ke li faris ĉi tion ... sed bonvolu ne diri al aliaj”. Oni parolis malantaŭ fermitaj pordoj kaj fenestroj: tiamaniere sekretoj malsekreteĝis kaj fariĝis konataj tra la lando.


Lastatempe la leĝaro koncerne la reĝon ŝanĝiĝis. Ĝis antaŭ nelonge la reĝo ne povis esti punata. Multaj nepalanoj taksis lin dio. Kaj nun la unua filo aŭ la unua filino de la reĝa familio rajtas sendiskriminacie fariĝi reĝo aŭ reĝino. Cetere ne plu necesas uzi apartajn, tiel nomatajn reĝajn vortojn

– longajn kaj nefacilajn – por prezenti novaĵojn pri la reĝo.

Ĉefministro

Tamen ĉio ĉi ne multe helpas. La reĝo kaj lia unua filo apartenas al la plej malŝatataj homoj en la lando. Nepalanoj pli kaj pli volas forigi la reĝon kaj lian familion, kiuj nun kaŝas sin en la reĝa palaco, el kiu venas de tempo al tempo mesaĝoj al la popolo, ke la reĝo plu regas. Efektive, tamen, regas la ĉefministro.

Ribelantoj, kiuj jam de dek jaroj batalas por starigi respublikon kaj kiuj nun eniris la registaron, kredas, ke baldaŭ ili realigos sian celon. Sed ankoraŭ ne



eblas diri kun certeco, ĉu aŭ kiam Nepalo fariĝos respubliko.

Navin SHRESTHA/pg

SUD-EŬROPO

Vojaĝo en Iberio



GERARD ESQUIER | PARRAMONA

Lisbono, lifto Santa Justa.

Por la pasinta somero mi planis instrui en la franca Esperanto-Kulturdomo Grésillon [grezijó] kaj poste veturi tra Francio. Tamen ĉi lasta intenco ne realiĝis. Mian paroligan Esperanto-kurson en Grésillon partoprenis homoj el diversaj landoj, inter kiuj ankaŭ portugala geedza paro Miguel [migél] kaj Manuela Boieiro

Lisbono, praça Pedro IV.



GERARD ESQUIER | PARRAMONA

[bojajru]. Ambaŭ invitis min gastigi ĉe ili. Tio vere pensigis min pri vizito al Portugalio, en kiu mi antaŭe ne estis. Fine mi akceptis la inviton. Mi pensis: Ĉu mi sukcesus ekkoni tiun landon kaj ties multfacetan vivon dum mallonga tempo?

Al Portugalio mi veturis trajne tra Tuluzo. Mi trapasis la francan-hispanan landlimon ĉe la Atlantika Oceano. Pireneoj ne tiel impresis al mi, kiel la multe pli altaj Alpoj. La apudeco de la oceano kaj supermara alteco influas la veteron: mi havis la impreson veturi ne al la sudo de Eŭropo, sed al aŭtuna Rusio, mia patrolando, kun ties grizaj nuboj, vento kaj malvarmo.

Atinginte Lisbonon, kun priskribita itinero en la mano, mi ekpaŝis sur kajo de la moderna neordinare vasta, plen-



Madrido, Plaza Mayor.

suna Orienta stacidomo. Ne estis problemo trovi la bezonatan bushaltejon: tiel precizaj estis la informoj de la gastiganta familio. Kaj jen mi ekveturis al Alcochete [alkuŝete], kiu troviĝas je 20 km for de la ĉefurbo. Survoje al ĝi mi pasis laŭ la 16-kilometra ponto „Vasco [vasku] da Gama”, kiu estas plej longa en Eŭropo.

Festo de Alcochete

Komence de mia restado familio Boieiro invitis min al la urba festo. Antaŭe Miguel estis 19 jarojn urbestro de Alcochete. Antaŭ kvar jaroj li elposteniĝis, tamen li plu aktivas en la urba konsilio kaj en multaj lokaj organizaĵoj. Ankaŭ Manuela aktive partoprenas en la socia vivo de Alco-



BAPTISTE PONS

Barcelono, maldekstre staras turo Agbar kaj dekstre staras Sagrada Família.



Madrid, Puerta de Europa.



OSVALDO GAGO

chete. Danke al tio ni triope aliĝis al la oficiala akcepto de la urbestro.

Oficistoj de la urbodomo, vestitaj en kostumoj (kompatinduloj: eksterre ja estis varmege – 35 gradoj!), iris tra la urbaj stratoj, vizitante diversajn profesiajn kaj amatorajn metikaj pentraĵekspoziciojn, trinkante kaj manĝante bongustaĵojn (i.a. daktilojn kun fromaĝo!). Surmetinte decajn vestojn por la okazaĵo, ankaŭ mi stoice suferis la varmegon.

La solena malfermo de la festo finiĝis per hisado de naŭ diversaj flagoj sur la ĉefa placo de Alcochete. Miguel hisis la flagon de Eŭropa Unio. Tiel komenciĝis la tradicia aŭgusta festo de la urbo *Festas do Barrete Verde e das Salinas* (Festoj de la verda ĉapo kaj la salejoj), kiu havis tre riĉan kaj allogan programon. Tiun vesperon, bele ornamita per diverskoloraj lampoj kaj rubandoj, Alcochete plenplenis je homoj: ne nur urbanoj, sed ankaŭ gastoj el najbaraj urboj ĝuis la varman vesperon kaj festan etoson, spektante koncerton de folkloro ensemblo.

Toreado

Lige kun mia gastado unu el la amikoj de familio Boeiro donacis biletojn por taŭrobatalo. Iun vesperon mi kaj Manuela eksidis antaŭĝue sur centraj subtegmentaj lokoj, ĉar je 6a horo posttagmeze ankoraŭ varmegas en Portugalio. La toreado postlasas neforgeseblajn impresojn. La afiŝo anoncis, ke en ĝi partoprenos ses kvarjaraj taŭroj,

kiuj pezas proksimume po 550 kg. Feliĉe, dum la portugaliaj taŭr-bataloj oni ne mortigas taŭrojn kontraste kun la hispanaj. La toreadoj, organizataj ĉi tie, reprezentas dupartan spektaklon. Post la impona eliro de bele vestita loka orkestro, kiu ludis la himnojn de Portugalio kaj Alcochete, sekvis majesta sinprezento de la ĉevalrajdantoj – rajdantoj kaj matadoroj, kiuj estis varme bonvenigataj de la ĉeestanta publiko. Poste komenciĝis la toreado mem. La lerta rajddado de rajdantoj kaj ilia profesieco entuziasmigis la ►

Barcelono, magia fonto kaj Palau Nacional.



KENNETH TAN



Dum la portugalaj taŭr-bataloj oni ne mortigas taŭrojn kontraste kun la hispanaj.

► publikon, kiu emocie reagis kaj forte aplaudis. Fine, ok bravuloj, havantaj siaspecajn kostumojn kun verdaj ĉapeloj surkape, kaptis la beston: unu el ili saltis sur ĝiajn kornojn, alia tiris la voston por malfortigi ĝin, aliaj ĉirkaŭis kaj saltis sur la taŭron. Vere tiuj viroj elektis tre danĝeran ŝatokupon!

La urba festo daŭris ses tagojn kaj ĉiu el ili havis tipe portugalajn programerojn: katolikan procesion, koncertojn de gitaristoj kaj blovorkestro, profesiajn aŭ amatorajn plenumojn de la famaj faduoj, lokan foiron. Okazis ankaŭ spektaklo, kiu estis reprezenta por la tuta festo. Enkadre de ĝi la urbestro honoris kelkajn urbanojn pro

iliaj meritoj, i.a. ankaŭ la plej kuraĝan verdĉapelulon. En tiu spektaklo estis ankaŭ miniatura toreado, en kiu krom plenkreskuloj aktorís ankaŭ infanoj kaj taŭrido. La festo de Alcochete finiĝis per meznokta malhisado de la flagoj kaj per prezentaĵo de piroteknikaĵoj.

Vizito al Lisbono

Mi restadis kelkajn tagojn en Lisbono, trarigardante vidindaĵojn sola laŭ la indikoj de Manuela kaj Miguel. Necesas mencií, ke en Portugalio multaj homoj bone komprenas aŭ parolas la francan lingvon: tradicie tie oni lernas la francan kiel la unuan fremdan lingvon, sed ekde certa tempo la landon ĉiam pli invadas la angla.

La vetero malboniĝis: ekblovis tre forta kaj iom malvarma vento kaj eĉ pluvetis. La relative friska vetero ne malhelpis min ekkoni la antikvan ĉefurbon de Portugalio, kiu konis invadojn de visigotoj kaj araboj, romianoj kaj hispanoj. Sur ties stratoj paŝis Vasco da Gama, Kolumbo kaj Magelano. Nun pri tio kaj multo alia atestas arktekturaj kaj historiaj monumentoj. Vere la tempo ne sufiĉis trarigardi ĉion, sed mi uzis la turistan buson por veturi tra la urbo.

En Lisbono mi ne preterlasis la okazon veturi ankaŭ per la tipa unuvagona tramo, kiu estas multe ŝatata de eksterlandaj turistoj. Estis interese viziti ankaŭ urbon Sintra – perlo de Portugalio, kiu troviĝas ĉe la atlantika marbordo kaj estis somera rezidejo de portugalaj reĝoj en la mezepoko.

Veturante el Lisbono al Setúbal, banloko kaj samtempe industria centro, sur monteto videblis malnova araba fortikaĵo de urbo Palmela. Tie aleo de altstaturaj palmoj ege impresis al mi pro ties kunigitaj kronoj.

La lastan tagon de mia restado en Portugalio mi vizitis kune kun miaj gastigantoj du muzeojn de Lisbono. En unu el ili, tiu de Calouste Gulbenkian, estas eksponataj eksterordinaraj artaĵoj, kolektitaj de la petrola magnato mem. Kelkaj el ili datumas de 2800 jaroj antaŭ Kristo. La kastelo de São Jorge [saŭn ĵorĝe], al kiu malrapide grimpis nia buseto, estis konstruita sur la plej alta pinto de la urbo. De tie perfekte ni ĝuis belegan panoramon de la urbo kaj ties plej malnovaj kvartaloj.

En la hispana ĉefurbo

Por reveni al mia hejmurbo Ivanovo en Rusio mi devis traveturi Hispanion. Do, mi profitis la okazon viziti ankaŭ tiun alian iberian landon. La veturo al Madrido estis planite efektiviĝi per taga buso (pri tio insistis Manuela), por ke mi povu pli bone vidi la iberiajn pejzaĝojn. La sidado sur komforta kaj larĝa fotelo en klimatizita buso agordis al dormeto, la ŝoseo ja estis tiel glata, ke oni ne sentis skuadon. Tamen la vigla diversspeca muziko en la aŭskultiloj, per kiuj estis ekipita ĉiu sidloko, kaj la alloga pejzaĝo direktis miajn okulojn eksteren. Ili „fotis” kaj tiamaniere memorfiksis porlonge vitejojn kaj pomarbajn kampojn, ebenaĵojn kun paŝtigantaj ŝafoj kaj bovinoj, montetojn kun sovaĝaj olivarboj, kurb- kaj rektliniajn ŝoseojn, ege bluan ĉielon kaj senkompatan aŭgustan sunon.

Mi disponis nur pri kvar tagoj por ekkoni la hispanan ĉefurbon. Ambaŭ miaj madridaj gastigantoj (hispana geedza paro) laboris dumtage, do mi vagadis sola. En Madrido funkciis ankaŭ turista buso, en kiu riceveblis informoj en kelkaj lingvoj, inkluzive la rusan. Dumtage buso veturis tra la urbo. Oni povas ĝin forlasi en iu ajn haltejo, promeni en certa kvartalo, kaj poste denove enbusiĝi, daŭrigante la veturon al alia interesa loko. Do, mi uzis tiun buson por trarigardi la hispanan ĉefurbon.

En Lisbono la tipa unuvagona tramo estas multe ŝatata de eksterlandaj turistoj.



FERRICL MAGGI | BONET

La sekva tago estis dediĉita al fama muzeo *El Prado*, en kiu mi sukcesis ankaŭ viziti la ekspozicion de Picaso-pentraĵoj. Posttagmeze mi vizitis la reĝan palacon. Konstruita en klasika baroko sub franca kaj itala influoj, laŭ la principo de kvarangula fasado, ĝi havas egalajn flankojn. Do, provizita per franclingva parolilo (pro manko de informoj en la rusa) mi transiris de unu riĉe ornamita ejo al alia, de porcelana salono al la trona, admirante surplaŝojn skulptaĵojn, enormajn spegulojn, kelktunajn lustrojn, ktp.

Vespere madridaj geesperantistoj venigis min al lokoj, kiuj ne ĉiam atingblas por organizitaj turistoj. Ni iris laŭ malnovaj stratoj, atingis la placon *Mayor* [majór], la ĉefan placon, kies fondiĝo estas ligita al la nomo de Filipo la Tria. 136 kvarnivelaj samstilaj domoj kun 437 balkonoj estas kunligitaj kaj formas grandegan kvadraton. Ĝuste ĉi tie okazadis diversaj festoj kaj eventoj: turniroj, luktoj de bovoj, proklamoj kaj geedziĝoj de reĝoj, ekzekutoj, popol-festoj. Ankaŭ nun la placo restas loko de renkontiĝoj kaj promenoj. Aparte viglas la vivo sur la placo dimanĉe matene, kiam sub arkoj funkcias bazaro de antikvaj poŝtmarkoj kaj moneroj. Iom lacaj pro la longa, tamen tre interesa promeno, ni eksidis en surstrata kafejo kaj gustumis iom ebriigan sangrion, tre refreŝigan trinkaĵon kun vino kaj pecoj de diversaj fruktoj.

Alian tagon buso veturigis min al Toledo, antikva kastilia ĉefurbo. Ĝi distancas je unuhora veturado de Madrido.

La muzeo El Prado en Madrido.



do. Promeni laŭ la pavimo de malnova urbo kun mallarĝaj stratoj estas mal-facile: ŝtonoj kaj ŝtonetoj dolorigas la piedojn, kiuj senlace plu paŝas. Tamen indis viziti ankaŭ la antikvan katedralon, superantan ĉiujn konstruaĵojn en Toledo, la kastelon kaj la etan preĝejon de Santo Tomé (Sankta Tomeo), en kiu estas eksponita unu el famaj pentraĵoj de El Greco [el greko] *El Entierro del Conde de Orgaz* (La enterigo de la grafo de Orgaz).

Ĉiuj vojoj kondukas al Barcelono

La interurbaj busoj estas relative malmultekostaj en Hispanio, kompare kun la trajnoj. Tial se oni busveturas tage, la veturo agrablas. Ĝis Zaragoza [saragosa] la buso duonplenis, sed poste ĉiuj sidlokoj estis okupitaj. (Ĉu en Hispanio ĉiuj vojoj kondukas al Barcelono?) Profitante la longan someran tagon, mi ekiris tra la urbo. Tie apudas longe konstruata kaj tre kurioza laŭforme templo *Sagrada Família* (Sankta Familio), kies talenta kreanto estas arkitekto Gaudí. Senĉese alvenis busoj kun fremdlandaj turistoj, kiuj rigardis, fotis kaj filmis la faman multpintan preĝejon. Ĉiutage homoj subsune staris envice por eniri ĝin.

Barcelona esperantisto volis nepre montri al mi alian allogaĵon de la vespera urbo. Veturante per la moderna metroo, ni eliris ĉe *Plaça d'Espanya* (Placo de Hispanio). Antaŭ ni, sur la monteto Montjuïc [munĝuik], videblis la majesta konstruaĵo de *Palau Nacio-*



MAREK HOLUB

Barcelono, la Sagrada Família.

nal [paláu nasiunál] (Nacia Palaco), kaj malantaŭ ties kupolo vidiĝis naŭ projekciataj lumradioj (laŭ la nombro de literoj en la vorto Barcelono), kiu formis ŝajnchronon. La homa tumulto igis nin rapidi al la granda fontano: ni sukcesis alveni por la komenco de akva spektaklo. Eksonis muziko kaj ekmoviĝis strioj de fluanta akvo: kurtaj kaj longaj, rapidaj kaj lantaj, gajaj kaj tristaj depende de la akompana melodio kaj diverskolora lumigado, daŭre alternantaj. La prezentaĵo daŭras dek minutojn, sed ni, kiel plejmulto de ĉeestantoj, emis sperti ankoraŭfoje tiun belan spektaklon. Ĝi ripetiĝis post duonhoro, absolute nova laŭ formoj, koloroj kaj muziko. La sekvan tagon mi pasigis en la urbo, uzante jam konatan duetaĝan turisman buson. Sed, bedaŭrinde, ĉi-foje aŭskultiloj mankis. Helpe de magraj franclingvaj klariĝoj en broŝureto mi informiĝas pri la vidindaĵoj de la urbo. Ĉiĉeroninoj nee respondis miajn demandojn pri gvidado en la rusa, franca aŭ Esperanto. Ili parolis pri Barcelono en la kataluna kaj en la angla lingvoj. Tio surprizis min, ĉar Katalunio ja estas parto de Hispanio kaj ĝis Francio ja estas malpli ol 200 kilometroj!

Do, finiĝis mia trisemajna restado. Mi iom triste adiaŭis Iberion. Tamen por ĉiam restos en mia memoro ambaŭ vizititaj landoj kaj ties loĝantoj, kiujn kunigas geografio, historio kaj kulturo. Krome, varma gastameco estas unu el la komunaj ĉeftrajtoj de iberianoj.

Tatjana LOSKUTOVA

OSWALDO GAGO

Navige tra prahistorio

Arkeologoj en Bosnio malkovris lastatempe en la rivero Neretva restaĵojn de du iliraj ŝipetoj pli ol 2200 jaroj aĝaj. Troviĝis en la barkoj, 14 metrojn longaj kaj 4 metrojn larĝaj, nomataj *Liburne*, diversaj relikvoj, inkluzive de amforoj kun samaĝa vino.

El priskriboj fare de antikvaj historiistoj kaj arkeologoj oni scias, ke iliraj barkoj kaj ŝipetoj estis tre fortaj kaj rapidaj. Danke al ili, ilirianoj (praŭloj de hodiaŭaj albanoj) regis longatempe Adriatikon de Istrio ĝis Ambrakio, antaŭ la tri iliraj-romiaj militoj (la lasta 168-167 antaŭ Kristo).

Antaŭ kelkaj jaroj bosnia-usona arkeologo trovis en montetoj proksime al Sarajevo spurojn de granda piramido verŝajne 30 000 jarojn aĝa. Ĝi estas konstruita de antikvaj loĝantoj de okcidenta Balkanio, probable pelasgoj aŭ antaŭuloj de ilirianoj.

Se la teorioj konfirmiĝos danke al plia samloka fosado, tio indikos, ke la civilizacio pelasga estas pli antikva ol la egipta aŭ la helena-romia. Tio notinde revoluciigos ĝisnunan historian pensadon.

Bardhyl SELIMI

Iliraj triboj en okcidenta Balkanio dum la helena periodo.



Sed *Tamiflu* ne fluas

La svisa farmacia firmao *Roche* [roŝ] kritikas mondajn registarojn, ĉar ili ne stokas sufiĉe da ĝia kontraŭvirusa medikamento *Tamiflu* por kontraŭstari grandskalan epidemion de gripo.

La Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) ne indikis, kiom da *Tamiflu* estu stokata, sed esprimis kontenton pri la preparoj en membroŝtatoj. MOS ripetis sian averton, ke nova stamo de gripo, eble el mutacio de la birda gripa viruso, estas iam atendata, kaj konfirmis, ke *Tamiflu* estas esenca elemento por malarmi la minacon.

Tamen *Roche* anoncis en aprilo, ke registaraj mendoj de la medikamento estingiĝis dum la unua jarkvarono de 2007, malgraŭ tio, ke la firmao pligrandigis sian produktokapablon.



Intencoj

Dum la du lastaj jaroj konstateblis, ke la plimulto de la registaroj en la mondo foriris de siaj originaj intencoj. Do kredeble restas multo farenda por atingi plej bonan preparitecon. Efikeco de la medikamento ne pridubblas. Temas pri mendoj kaj kiom preparitaj volas esti la registaroj. Laŭ William Burns, estro pri farmaciaj produktoj, la firmao ne povas amasigadi varojn sen klientoj.

Roche kapablas produkti 400 milionojn da dozoj (po dek kapsuloj) jare,

sed intencas limigi produktadon laŭ hodiaŭa mendado, t.e. 215 milionoj da dozoj jam menditaj de registaroj. MOS antaŭvidas, ke eble infektiĝos ĝis miliardo da homoj kaj mortos inter 2 kaj 7,4 milionoj. Entute 170 el la 193 MOS-membroŝtatoj havas planon por trakti grip-epidemion. Amasigado de *Tamiflu* estas nur unu el gamo de rimedoj rekomendataj de MOS.

Svislando intencas vakcini la tutan loĝantaron okaze de virulenta viruso.

Marteno ECOTT

Steluloj ĉe la stirilo

Komence de majo, dum dek horoj, la placo Patrino Tereza en la albana ĉefurbo Tirano transformiĝis en grandan parkejon – ne por ordinaraĵoj aŭtoj, sed por la plej luksaj apartenantaj al steluloj el la mondoj de kino kaj modo.

La ŝoforoj, diversnaciaj riĉeguloj, partoprenis la aŭtokonkurson *Gumball 3000*. Tiel, en siaj *Porsche* (entute 21), *Ferrari*, *Lamborghini* kaj aliaj plej multekostaj kaj potencaj sportaŭtoj ili traveturis plurajn eŭropajn landojn (sed nek Germanion, nek Turkion, kiuj

malpermesis al la ŝoforoj trapasi sian teritorion).

La albanaj instancoj taksis la viziton granda turisma evento. Eĉ la ĉefministro Sali Berisha bonvenigis la milionulojn kaj vespermanĝis kun ili. Tamen la vizito ne senprobleme okazis. Brita ŝoforo kaŭzis akcidenton kaj mortigis maljunan paron en Makedonio. La loka polico arestis la ŝoforon kaj ne permesis al li forlasi la landon.

Ne eblas diri, ke la aŭtoj kaptis la intereson de la albanoj. En Albanio oni kutimiĝis al luksaj aŭtoj: tie tro-



Pli allogis la stelula ŝoforaro ol la luksaj aŭtoj, kiuj paradis tra la centro de Tirano.

veblas granda kvanto de *Mercedes*-aŭtoj (plejparte ŝtelitaj aŭ kontraŭleĝe importitaj). Ŝajne la steluloj allogis la spektantojn.

Bardhyl SELIMI

Busaj servoj plibonigendaj

Freŝa informo de la Administrejo pri Urbanizado montras, ke en pluraj urbegoj de Ĉinio la rapideco de aŭtobusoj pli kaj pli malkontentigas la urbanojn. Precipe matene, kiam la urbanoj devas veturi al siaj laborlokoj, preskaŭ ĉiam la rapideco falas sub 10 kilometrojn hore pro trafikŝtopiĝo.



En Pekino.

En la ĉefurboj de kelkaj provincoj, kiel Xi'an, Chengdu kaj Hangzhou, la meza rapideco de busoj estas malpli ol tiu de bicikloj, kiuj facile povas atingi 12 kilometrojn hore. Ofte okazas, ke eĉ grandaĝuloj, por mallongigi la vojaĝtempon, preferas biciklon. Kompare kun la periodo 2005-2006 en 2007 veturanto bezonis po dek minutojn pli por busveturado. Tio jam plurfoje provokis akrajn plendojn ĉe la ministrejo pri trafiko.

Ankaŭ aliaj plendoj

Aparte de tio, la pasaĝeroj estas nekontentaj ankaŭ pri la prezo de la

biletoj kaj pri la konduto de ŝoforoj kaj konduktoroj. Por ordinara buso oni por unu veturado pagas unu juanon, sed por luksa, klimatizita buso du juanojn aŭ eĉ pli. Por iri labori, oficisto nepre uzas busojn ĉiutage kvar fojojn kaj kutime en unu monato elspezas pro trafikostoj sume 200 juanojn, tio estas sepono de lia monata salajro. Ĝeneruloj, kiuj malhavas rimedojn, estas embarasitaj pro la alta prezo de biletoj. Senmonaj studentoj kelkfoje ŝtele enbusiĝas por eviti aĉeti bileton.

Ofte kompanio pri urba trafiko povas buson nur per unu ŝoforo kaj unu konduktoro. Dum la veturo ili es-

tas plene okupitaj de veturado, vendo de biletoj kaj anoncado de haltejo. Ĉar plimulto de la linioj havas pli ol 20 haltejojn kaj estas superŝarĝitaj, estas apenaŭ evitebla fenomeno, ke la longa veturado kaj la iaciga servado faras ŝoforon kaj konduktoron de tempo al tempo malbonhumoraj kaj ke ili donas al la pasaĝeroj malbonkvalitan servon.

Kvankam dum la lastaj du-tri jaroj en ĉinaj urbegoj la publika trafiko relative rapide disvolviĝis, restas granda diferenco inter la trafika kapablo kaj la postuloj fare de la urba ekonomio. La estro de la Administrejo pri Urba Trafiko konfesis al la gazetaro, ke nun en ĉinaj urboj la publika trafiko estas tre limigita pro la nesufiĉa infrastrukturo. La urba bustrafiko ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne atingis radikalan ŝanĝiĝon. Estas du ĉefaj problemoj. Unuflanke, post la perdo de agroj, aroj da kamparanoj eniras en la urbojn por labori kaj ofte elektas relative malaltekostan buson kiel kutiman veturilon. Aliflanke, sen pli da mono la urba registaro povas nur malforte subteni la publikan trafikon kaj ne povas plimultiigi aŭ renovigi busojn.

Statistikoj konfirmas

La statistikaj donitaĵoj, kiuj lastatempe aperis en la ekonomia bulteno de la Ŝtata Statistika Buroo, konfirmas la situacion. La reala stato de aŭtobusoj, aludata de la donitaĵoj, vere pensigas la trafikajn instancojn de la ĉina registaro. Unue, nuntempe en la urba trafiko la aŭtobusa transporto okupas proporcion de malpli ol 10 % de la tuta transportokvanto. En kelkaj urbegoj, kiel Pekino, Ŝanhajo kaj Kanton, tiu proporcio estas pli alta, sed restas sub 20 %. Due, la nombro de busoj ne sufiĉas. Ekzemple en Chengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco, por

ses milionoj da ofte vojaĝantaj urbanoj oni havas malpli ol mil busojn. Trie, dum en la plimulto de la grandaj urboj en Eŭropo, Japanio kaj Suda Ameriko busveturantoj reprezentas 40 ĝis 60 % de la uzantoj de publikaj trafikiloj, en Ĉinio ili konsistigas nur trionon ĝis duonon de la uzantaro de la publika transporto. Cetere, por aŭtobusoj baldaŭ troviĝos forta konkurenco, ĉar pluraj urbegoj nun konstruas metroojn, kiuj laŭplane ekfunkcios jam en 2007 aŭ 2008.

Konsiderante la nunan nebonan staton de la urba publika trafiko, antaŭ nelonge la ministrejo pri trafiko okazigis en Pekino tutlandan kunvenon. La ĉeestantoj decidis antaŭ ĉio potence progresigi la aŭtobusan aferon por moderigi la trafikan problemon kaj igi la veturadon de ordinaraĵoj pli oportuna kaj pli komforta.

Mu Binghua



En Ŝanhajo iom malpli ol 20 % de la urba trafiko okazas per busoj.

Pli da riĉeguloj

La ekonomia revuo *Forbes* en marto 2007 aperigis liston de la plej riĉaj personoj en 2006. En la unua loko, jam de 13 jaroj, restas Bill (oficiale William) Gates, estro de *Microsoft*. La nombro de riĉegaj personoj en Rusio, Barato kaj Ĉinio pligrandiĝis rimarkinde.

Bill Gates posedas 56 miliardojn da usonaj dolaroj. Lin sekvas Warren Buffett, talentulo pri akcioj, kiu posedas propran riĉaĵon de 52 miliardoj da dolaroj. Lin sekvas Carlos Slim Helú, telekomunikada magnato de Meksiko; lia riĉaĵo dum 2006 atingis la plej grandpaŝan kreskon de 19 miliardoj.

Laŭ la listo de *Forbes*, la nombro de personoj, kies riĉaĵoj superis unu miliardon da dolaroj, atingis 946 – nova rekordo en la historio.

En la pasinta jaro 53 rusoj enlistiĝis. Tiu cifero jam

alproksimiĝas al tiu de Germanio, kaj Rusio eble baldaŭ iĝos, post Usono, la dua lando de la mondo laŭ la nombro de riĉeguloj. Kompare kun 2005, la nombro de riĉeguloj el Barato kaj Ĉinio preskaŭ duobliĝis. Barato nun havas 36. Inter ili tri estis vicigitaj inter la 20 unuaj de la mondo.

Ĉinaj regionoj superas la aziajn

En 2005 en la ĉina landinterno estis sep superriĉuloj, kiuj havis kapitalon de po miliardo da dolaroj aŭ pli. En la pasinta jaro tiu cife-



ro kreskis ĝis 20. En Honkongo la kvanto de riĉeguloj pliiĝis je kvin kaj atingis 21. Tajvano havas ok. Se oni kalkulas la sumon de la riĉeguloj en la tri regionoj de Ĉinio, sume estis 49, kaj laŭ tio Ĉinio jam superas la aliajn aziajn landojn.

Mu Binghua

Epidemiaj sekvoj en Eŭropo



CURTIS PALMER



JOEL WILLIS

Dengan febron kaŭzas kuloj, kiuj nun pro la varmiĝo de la klimato reproduktiĝas pli facile.

Ĉu la tero fariĝos saŭno? – tiun elokventan titolon portis la kovrililo de la revuo fine de 2005 (MONATO 2005/11). En tiu sama numero aperis artikolo de la ĉefredaktoro Stefan Maul *Migrobirdoj*, kie la aŭtoro tre bedaŭras, ke la hirundoj pro plivarmiĝo „jam ne plu venas al Germanio en meza Eŭropo”. Nu, ja, efektive, ŝanĝoj de migrovojoj de la birdoj estas preskaŭ objektiva kriterio de la tutmonda plivarmiĝo. Sed kion pri tio diras la sciencistoj? La plimulto el ili fakte konfirmas la realecon de la tutmonda plivarmiĝo kaj certas, ke la klimatsanĝoj estas precipe kaŭzataj de homa agado. Ili indikas, ke longdaŭra kresko de industriaj ellasoj de forcejaj gasoj (ĉefe karbondioksido, sed ankaŭ metano kaj iuj aliaj gasoj) povas draste altigi la tutmon-

dan averaĝan temperaturon. Rezulte de tio komencos degeli la glaĉeroj de Arkto kaj Antarkto, de multaj montaroj (ekzemple, de Alpoj), Gronlando ktp, kio kondukos al vastegaj apudbordaj inundoj kaj eĉ al malapero de multaj apudbordaj urboj.

Estas ankaŭ malmultaj sciencistoj, kiuj opinias, ke la klimatsanĝoj ne estas kaŭzataj de homoj, sed dependas de naturaj procezoj. Mi ne intencas diskuti la kaŭzojn de la tutmonda tervarmiĝo, ĉar mi ne estas specialisto pri klimatologio. Tial por mi nur gravas, ke sendepende de la kaŭzoj, plivarmiĝo estas objektiva fenomeno. Kiel epidemiologo, sube mi atentigas la epidemiajn sekvojn en Eŭropo rezulte de la tutmonda plivarmiĝo. Antaŭ ĉio mi traktos la probablan disvastiĝon de iuj infektmalsanoj.

Paradizo por insektoj kaj akaroj

Ekzistas multaj infektmalsanoj, kies disvastiĝo pleje dependas de temperaturaj kondiĉoj. Tiuj estas la malsanoj, kiuj transmissiĝas per sangosuĉantaj insektoj kaj akaroj. El ili la plej minaca estas malario, kaŭzata de protozooj (plasmodioj), kiuj transmissiĝas per kuloj de la genro anofelo (*Anopheles*). Antaŭ ĉirkaŭ 60-70 jaroj malario en Eŭropo ankoraŭ estis disvastiĝinta malsano. Rezulte de utiligado de novaj persistaj insekticidoj kaj efikaj kuraciloj epidemioj de malario en Eŭropo iom post iom komencis retiriĝi kaj baldaŭ estis praktike likviditaj. Nuntempe en la eŭropaj landoj estas registritaj unuopaj kazoj de malario, precipe enportitaj el endemiaj regionoj. Sed en multaj landoj de la mondo ĝis nun malario estas terura plago por la loĝantoj. Do en Afriko ĉiujare aperas pli ol 500 milionoj da novinfektitaj malariaz malsanuloj, el kiuj pli ol du milionoj pereas, precipe rezulte de malariaz cerbaj komplikadoj. La plej danĝera plasmodio, *Plasmodium falciparum*, kaŭzanta tropikan malarion, en multaj regionoj fariĝis rezista al multaj antaŭe efikaj kuraciloj. Pro klimatplivarmiĝo en Eŭropo aperos la plej favoraj kondiĉoj por reproduktiĝo de kuloj. Alta temperaturo rapidigos la evoluon de kulaj larvoj. Krome, pli varma vintro permesos al multaj kuloj

travintri en la matura stadio. Rezulte de enmigrado al Eŭropo de multaj rifuĝintoj el tropikaj regionoj, kie tutmonda plivarmiĝo povas kaŭzi klimatskekon kaj senrikoltecon, verŝajne venos homoj, infektitaj de malario, kio kune kun abundeco de malaraj kuloj povas konduki al epidemia eksplodo de malario en Eŭropo.

Kuloj kaj moskitoj

Pro plivarmiĝo en Eŭropo aperos favoraj kondiĉoj por disvastiĝo de alia malsano: okcident-nila febro. Tio estas danĝera virusa infektmalsano, transmissiata de kuloj, por kiu estas karakterigra grava komplikaĵo: meningito-encefalito. La malsano jam delonge eliris el Afriko kaj antaŭ nelonge estis registrita en multaj landoj: Usono, Kanado, Israelo, Rumanio, Rusio kaj aliaj. En Rusio preskaŭ ĉiujare epidemioj de la malsano okazas en la volgograda kaj astraĥana regionoj. Grandan rolon en la disvastigo de la malsano ludas migrantaj birdoj. Rezulte de plivarmiĝo oni ne povas escepti aperon en Eŭropo de tiel danĝeraj virusaj hemoragiaj malsanoj, kiel denga febro kaj flava febro. La vehikloj de iliaj virusoj estas kuloj, precipe de la genro *Aedes*, kiuj estas tre senkapricaj kaj povas reproduktiĝi rezulte de plivarmiĝo en iaj ajn flakoj.

Dum plivarmiĝo aperos favoraj kondiĉoj por reproduktiĝo de moskitoj, kiuj en Eŭropo transmissias la protozoan malsanon viscera leŝmaniozo. Ĝi estas tre danĝera malsano, kiu atakas la medolon, sangon, hepton, lieon. Sen kuracado ĝi estas absolute mortiga (por kuracado estas sukcese aplikataj precipe preparaĵoj de antimonio). En Eŭropo la malsano precipe renkontiĝas en la landoj mediteraneaj (Italio, Hispanio kaj aliaj). Nuntempe, laŭ informo de sciencistoj de tiuj landoj, viscera leŝmaniozo estas pli disvastiĝinta pro oftigo de aidoso, kiu detruas la imunstaton de infektitoj.

La klimatplivarmiĝo en Eŭropo kontribuos al plimultiĝo de akaroj kaj transigoj de iliaj malsanoj. La plej aktuala kaj disvastiĝinta estas la akara borelio, kaŭzata de la spiralecaj bakterioj *Borrelia burgdorferi*. Alia nomo de tiu malsano estas „Lajm-malsano”



Kuloj kaŭzis la okcident-nilan febron ĝis nun ĉefe en Afriko. Pro la varmigi de la tero kazoj estas nun registritaj en Usono, Kanado, Rusio kaj aliaj.

(Lyme [lajm] estas urbo en Usono, kie pli ol 30 jarojn antaŭe estis distingita tiu malsano). Dum la malsano precipe estas atakataj la dermo (per migranta eritemo), artikoj, nerva sistemo, koro. Kvankam la malsano estas bone kuracebla per antibiotikoj, ĝi povas transiri al kronika formo. La Lajm-malsano transmissiĝas per la mordo de akaroj de la genro *Ixodes*. La malsano estas registrata preskaŭ en ĉiuj kontinentoj. Plej ofte ĝi renkontiĝas en Usono, sed estas registrata ankaŭ en Kanado kaj en multaj landoj de centra, nord-okcidenta kaj orienta Eŭropo. En Rusio la malsano estas diagnozata precipe en orientaj kaj nordaj regionoj.

Alia virusa malsano, kiu transmissiĝas precipe per mordo de akaroj de la genro *Ixodes*, estas akara encefalito. La malsano estas precipe disvastiĝinta en la azia parto de Rusio (Siberio, Malproksima Oriento kaj aliaj regionoj). Lastan tempon, pro plivarmiĝo, la akara encefalito fariĝis pli disvastiĝinta en multaj landoj de nord-okcidenta, orienta kaj centra Eŭropo.

Unu el la plej danĝeraj virusaj malsanoj, kiu oftigis pro plivarmiĝo, estas la konga-krima hemoragia febro. La viruso transmissiĝas per mordo aŭ hazarda dispremado de infektitaj akaroj precipe de la genro *Hyalomma* kaj dum kontakto kun sango de malsanuloj. Por la malsano estas tipaj multnombraj hemoragioj. La malsano estas ofte registrata en multaj regionoj de Afriko kaj Azio. Lastan tempon pro plivarmiĝo oftigis epidemioj de la malsano en la sudaj regionoj de Rusio. En

Eŭropo la malsaniĝintoj de la konga-krima hemoragia febro estis registritaj ankaŭ precipe en sudaj regionoj (Grekio, Bulgario, Serbio kaj aliaj).

Kiu estas avertita, tiu estas armita

Do, la tutmonda plivarmiĝo estas danĝera ne nur pro tiaj teruraj sekvoj, kiel subakvigado de la multaj apudbordaj urboj, uraganoj ktp, sed ankaŭ pro kredbla apero de multnombraj epidemioj de la danĝeraj infektaj malsanoj. Tial tre gravas anticipe entrepreni preventajn agadojn kontraŭ probablaj epidemioj ... Estas malfacile preventi la aperon de infektmalsanoj transmissiĝantaj per sangosuĉantaj insektoj. Necesas ellabori efikajn teknikajn rimedojn por preventado de la apero de marĉejoj ktp. Al sciencistoj tre gravas krei novajn efikajn kaj sendanĝerajn insekticidojn. Nuntempe jam ekzistas vakcinoj kontraŭ la akara encefalito. Estas ricevitaj la unuaj esperigaj rezultoj de la provo de la malarie vakcino, kvankam por la finfara bato ankoraŭ necesos kelkaj jaroj. Antaŭ nelonge estis ricevitaj novaj kontraŭmalaraj kuraciloj faritaj el la ĉina kreskaĵo *Artemisia annua*. Estas kreita vakcino kontraŭ la Lajm-malsano, sed ĝia praktika utiligado elvokas akutajn diskutojn, precipe en Usono, pro eventualaj komplikaĵoj. Plej gravas ĉiam esti atentegaj rilate al la apero kaj disvastiĝo en Eŭropo de infektmalsanoj rezulte de la tutmonda plivarmiĝo. Eĉ pli simpla solvo estus eviti la tutmondan plivarmiĝon, la kaŭzon de tiom da nebrideblaj komplikaĵoj.

Vladimir LEMELEV

Opinioj plej kompetentaj



Kiu estas Humphrey Tonkin, ne necesas klarigi al kiu ajn, almenaŭ iomete engaĝita en Esperanto-movadon: ja dum pli ol 40 jaroj li okupis ŝlosilajn poziciojn en ĝi – jen formale, kiel prezidanto aŭ estrarano de TEJO kaj UEA, jen simple influante ĝin per sia aŭtoritato. Kaj resumo de liaj meditoj pri tio, kio estas la verda popolo kaj movado, kiaj ili estas kaj estu, ne povas esti neinteresa por ĉiuj, kiujn tuŝas tiuj problemoj. Ĉar, ideale, tia estas ĉiu esperantisto, la libro devas fariĝi furora en la esperantlingva merkato. Se tiel ne okazos, do, nia lingva komunumo jam tro degeneris.

Ne nur pro la nenombreblaj movadaj aktivecoj famas Tonkin, sed ankaŭ kiel brilega oratoro kaj stilisto. Mi simple envias al la studentoj, kiujn li instruas! Tial la libro estas ne nur interesa enhave, sed ankaŭ bone legeblas. Legante la liniojn, mi kvazaŭ aŭdis lian voĉon, riĉan je taŭgaj intonacioj. Fakte, la bazo de la libro estis origine prelegaro, kiun li pretigis por la *Interlingvistikaj studoj* en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań en 2005. Danke al la eldono de la libro, nun ĉiuj povas konatiĝi kun la skizo de la spertoj kaj pensoj de la eminenta persono.

Komencanta esperantisto-aktivulo trovos en la libro, verŝajne, tre

multe, kio helpas ŝin aŭ lin akiri ĝeneralajn sciojn pri la movado kaj kompreni, kiel necesas pli bone plani sian agadon. Aktivulo sperta, longe kuiriginta en la esperantista medio ĉirkaŭ UEA, ricevos, eble, ne tro multe da novaj informoj – kaj ja ne por tiuj spertuloj estas ĉefe destinita la libro. Sed ankaŭ ili povas trovi en ĝi multon interesan – ekzemple, bonajn kaj precizajn formulojn de certaj problemoj, klare epinitajn resumojn de plurjaraj meditoj. Aferoj, kiuj ŝajnis jam rutinaj pro longa ripetado, aperas freŝaspekte, kaj en tiu formo povas elvoki pliajn meditojn tiudirektajn.

La libro konsistas el ok ĉapitroj-prelegoj: *La lingvo kaj ĝia rolo: idearo kaj ideologio; Lingva politiko interna kaj ekstera; Kio estas lingvopolitiko?; Lingvokultivado; Eksteraj rilatoj: UN kaj Unesco; Nunaj kaj estontaj strukturoj; La Esperanto-komunumo en la mondo; Esploroj kaj estonteco*. Tre larĝa kaj varia temaro!

Multaj aferoj en prezento de Tonkin aspektas freŝe pro tio, ke li, tute ne fokusante la atenton je iuj problemoj de lingvo mem (ĉar li tute prave atentigas, ke Esperanto estas unuavice interesa ne de lingva vidpunkto, sed de la soci-lingva), parolas, uzante siajn sciojn de eminenta lingvisto. Tial nia mondeto kaj ĝiaj rilatoj al la granda mondo aspektas iom alimaniere, en pli vasta perspektivo, ol en prezento de esperantisto, kiu kiel lingvisto estas amatoro. Por mi, ekzemple, la unuan fojon fariĝis klare, kio ja estas „lingvoplanado” en ĉiuj siaj flankoj kaj aspektoj, diverseco en kompreno de eĉ simplaj nocioj, kiel „dulingveco”, kaj simile. Kun granda kontento mi komprenis, ke ne povas ekzisti objektivaj manieroj por statistiko de la nombro de espe-

rantistoj, estas tute ĝustaj de la scienca vidpunkto.

Certe, ĉar Tonkin ĉiam estis aktivulo en la kadroj de UEA, liaj imagoj estas iom UEA-centrismaj. Eble tio estas ĝusta – ja vivo de nia lingvokomunumo reale turniĝas ĉirkaŭ tiu organizaĵo, kaj ĝia stato kaj estonteco, inkluzive tiujn eĉ de Esperanto-Civito, finfine dependas de la stato kaj estonteco de UEA. Tamen fokusiĝo je nur UEA, kaj neglekto de ideaj atingoj en aliaj rondoj de la komunumo, foje kondukas la aŭtoron al „inventoj de biciklo”. Ekzemple, kiam en la 1970aj jaroj li, diskutante kun Lapenna, diris, ke en certaj okazoj plena politika neŭtraleco en formo de distanciĝo de kiu ajn politiko estas, reale, apogo de la plej dekstra politiko, tio estis nur ripeto de tio, kion malkovris Lanti kaj aliaj fondintoj de la laborista E-movado 50 jarojn pli frue. Aliflanke, li bone konscias pri certaj dekstrismaj danĝeroj, kiujn enhavas subteno de „konservado de diversecoj”, vaste apogata en UEA kaj ĉirkaŭ ĝi. Ĝenerale la libro donas grandan materialon por kvankam ne konkluda, tamen fruktodona meditado pri tio, kio fakte estas neŭtraleco.

Ĉar en la libro temas multe pri ideologiaj problemoj de la movado kaj komunumo, fine estas aldonitaj tri multfoje cititaj en ĝi dokumentoj: *Deklaracio de Tyresö, Manifesto de Raŭmo kaj Manifesto de Prago*. Tio helpas konatiĝi kun la aŭtentikaj tekstoj kaj kompreni ilian esencon sen speciala serĉado kaj tial estas aparte utila al novaj aktivuloj. Do, tre saĝa libro de granda saĝulo, nepre legenda por ĉiu, kiu kontribuas aŭ volas kontribui al la Esperanto-movado.

Nikolao GUDSKOV

Humphrey Tonkin: *Lingvo kaj popolo*. Eld. UEA, Rotterdam, 2006. 159 paĝoj, broŝurita. ISBN 92 9017 093 X.

Prezo ĉe FEL: 14,00 eŭroj + aŭfranko.

Histori-romano

Ĉi tiu verko estas romanigo de historiaj eventoj, okazintaj plejparte dum la unua duono de la dudeka jarcento. Ĝenerala temo, trairanta la verkon, estas historie grava artisto, Ferdinand Hodler, pli ĝuste, kelkaj liaj pentraĵoj; eĉ pli precize, la plejparto de la romano detale priteamas modelinon lian, nomatan Jeanne Charles [ĵan ŝarl] Cerani-Ĉiŝiĉ.

Ni komencas per Ferdinand mem, kies memportreto estas la bildo sur la kovrilo de la libro, kaj kies desegnaĵoj estis uzataj por la kvindek-franka svisa monbileto dum multaj jaroj. Sur unu flanko de tiuj monbiletoj estis desegnita bildo de lia modelino Jeanne. Ekzistis du variantoj de tiuj monbiletoj, kaj fotoj klare montras ilin en la libro.

La libro komenciĝas per la renkontiĝo de Ferdinand Hodler kaj Jeanne, kiu fariĝas longatempa modelino por li. Ferdinand, tamen, neniam edziĝis kun Jeanne, kaj fine ili apartiĝis. Ŝi, tamen, tutvive memoris lin kaj kolektis pentraĵojn liajn. Li mem, post la apartiĝo, ŝajne preferis forgesi pri Jeanne, kiu por li rolis kvazaŭ efemere kiel sekskunulino kaj allogaspekta modelino.

Post la apartiĝo de Ferdinand kaj Jeanne ni sekvas la vivon de Jeanne dum la ceteraj du trionoj de la romano. Ŝia vivo estis malfacila. Dum flegado de militvunditoj de la unua mondmilito Jeanne renkontis vunditon, nomatan Meho Ĉiŝiĉ, kaj edziniĝis al li. Li fariĝis nealtranga konsulejano de la nova jugoslavia reĝimo kaj konsekvence estis relokata ĉiun duan aŭ trian jaron al nova urbo, komence al urboj en Usono, poste Kanado, poste Eŭropo, fine Jugoslavio, kie li restis ĝis la emeritiĝo; kaj, kompreneble, Jeanne devis akompani lin. Kun ŝi iris aro da pentraĵoj kaj desegnaĵoj, faritaj de Ferdinand Hodler.


Pasis la jaroj. Okazis kaj pasis la dua mondmilito. Meho elektis loĝi en Mostar, do lin fidele akompanis Jeanne.

En 1965 Jeanne mortis. La sekvan jaron ŝia nevino, kiu heredis la aron da hodleraj verkoj, kiujn konservis Jeanne, vendis la kolekton al artgalerio, kiu disponigis ĝin al *Kunstmuseum* en Berno. En 1978 tiu artmuzeo publike ekspoziciis la kolekton kaj eldonis dikan katalogon de la kolekto.

Ĉar per Interreto mi ne sukcesis trovi pli da informoj pri Jeanne Ĉiŝiĉ, ol ke ŝi estis modelino por Ferdinand Hodler, kaj ke, post ŝia morto, ŝia kolekto estis vendita al artmuzeo, mi ne povis kontroli la multajn detalojn pri ŝia vivo, kiel ili estas rakontitaj en ĉi tiu libro. Verŝajne, temas, kiel kutime en histori-romanoj, pri faktoj, konjektoj kaj versimilaj elpensadoj de la aŭtoro.

Ankaŭ menciindas, ke en la unua duono de la romano aperas kelkaj, jam bone konataj, faktoj pri la filo de Ferdinand, Hector Hodler, esperantisto, kiu grave rolis dum la unua jardeko de la dudeka jarcento.

Kiel romano, aŭ historirakonto, la verko ne kontentigis min. Ĝi estas epizodema, kun, kiel ŝajnas al mi, nemulta, aŭ eĉ preskaŭ nenio da, interrilato inter la ĉapitroj. La stilo estas klara, sed mi mem sentas ĝin nek kiel bonan romanon, nek kiel bonan historirakonton. La titolo de la libro, en la plejlasta parto de la libro, rilatas al la fakto, ke la Hodler-pentraĵkolekto finveturis, kun



Jeanne, al la urbo Mostar, antaŭ ol esti vendita. Sed kvankam Ferdinand Hodler evidente estis celita esti kerna temo de la romano, li kvazaŭ perdiĝas en la plej granda parto de la romano, kiu temas pri Jeanne.


Sendube, aliaj legantoj opinios alie.
De gustibus non est disputandum.

Donald BROADRIBB

Spomenka Štimec: *Hodler en Mostar*. Eld. Edistudio, Pisa, 2006. 105 paĝoj gluitaj. ISBN 978-88-7036-073-8.

Prezo ĉe FEL: 16,65 eŭroj + aŭfranko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,



Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;

rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato
aŭ per www.retbutiko.net.

Ses miniaturaj humuraĵoj

Bombatako

**Bombo eksplodas
la kamerao
ĉion vigle notas:**
„Je bona Dio, homoj,
kuru elegante
kaj sincere ridu,
vi estos surekrane
ĝin vi nepre fidu.”

Diable

Diablo proponis:
„Mi legas viajn poemojn
se vi eniros la inferon,
la paradiz' malŝatas ilin
ĉar tie oni ne toleras veron.”

Sizife

**Miajn poemojn mi ruladis
ĝis la pinto de l' monto.
Tie staris recenzisto
kaj forruligis ilin
en abismon.**

Potenco

**Samkiel estiĝis kaj pereis
la Roma Imperio
samtial pereis
mia ampasio.**

La Belo

**En mia domo
belas ĉio
krom
mia mio.**

Metamorfozo

**Post operacio
li iĝis ino
kaj lia edzino
ŝia bofratino.**

Zora HEIDE



Sen Rodin

Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

NOVA!

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandanino. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

ISBN: 90 77066 22 5
Pezo: 320 g
Prezo ĉe FEL: 24,00 €
+ franko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;
www.retbuto.net, retbutiko@retbutiko.net, aŭ ĉe via kutima librejo.

ANONCETOJ

Feliĉu, eblas! Kiu ankoraŭ ne ricevis tiun senpagan broŝuron, tiu petu ĝin ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando. Aŭtoro : O. M. Aĭvanhov. Esperantigo de Claude Piron. Por detalaj klarigoj vidu http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html

Fantomo hantas tra l' mondo. 16-a konferenco por (eks)komunistoj en Dobrichovice, Ĉeĥio, 2007/09/12-16. Aliĝilojn mendu ĉe Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH 4702 Oensingen. Rete: IKEK2007@gmail.com

4 senpagaj libroj por bibliotekoj de esperanto-societoj. Se via esperanto-societo ne posedas la sekvajn librojn, petu la mankantajn titolojn ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando, kaj vi ricevos ilin senpage. **Titoloj de la 4 libroj:** Oraj reguloj por la vivo ĉiutaga - La joko de nutrado - Espero por la mondo : spirita galvanoplastiko - Sub la regno de la kolombo : paco regu. Temas pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj, nutrado, ktp. Aŭtoro : O. M. Aĭvanhov. Esperantigo de Claude Piron. Por detalaj klarigoj vidu : http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html

... jarfine al IF! Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru


Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ ĉe via landa peranto

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be